

Antaŭparolo

MARK FETTES

La ĉi-volumajn artikolojn kaj diskutojn elkovis la unua Nitobe-Simpozio de Internaciaj Organizaĵoj (Prago, 20-23 julio, 1996). Organizita lige kun la 91-a Universala Kongreso de Esperanto, la simpozio markis la 75-an datrevenon de la partopreno de d-ro NITOBE Inazō, Asista Ĝenerala Sekretario de Ligo de Nacioj, en la 13-a UK samurbe. Inter tiuj invititaj al la simpozio troviĝis eksaj kaj aktualaj oficistoj de Unuiĝintaj Nacioj kaj Unesko, reprezentantoj de lingvaj kaj politikaj instancoj en Eŭropa Unio, kaj esploristoj pri lingvo-imperiismo kaj lingvaj rajtoj.

Kiel klarigas la unua sekcio, la raporto kiun d-ro Nitobe prezentis al Ligo de Nacioj – represita ĉi tie – helpis lanĉi la unuan seriozan diskuton pri Esperanto kadre de interregistara organizaĵo. La simpozio celis repreni la fadenojn de tiu diskuto, ekzamenante la signifon de Esperanto en la moderna internacia vivo, laŭ deinternaj same kiel deeksteraj perspektivoj. El tio rezultis vigla kaj vasta opini-interŝanĝo.¹ Mi esperas ke ĉi tiu volumo instigos decidantojn en la internacia politiko zorge pripensi la lingvo-elektojn necesajn por komunikado, kaj la long-perspektivajn, sistemajn konsekvencojn de tiuj elektoj. Ĝi ankaŭ identigas kelkajn tiklajn demandojn por la Esperanto-movado, kiuj meritas pli profundan esploradon.

La simpozio okazis en Esperanto, la angla kaj la franca, kun samtempa interpretado. Pro kostaj konsideroj ne eblis aperiĝi apartan aktaron en ĉiu lingvo; anstataŭe, ni elektis prezenti ĉiun referaĵon kaj grandan parton de la diskutoj en la originala lingvo, kune kun referaĵ-resumoj en ĉiuj tri lingvoj. La resumojn sekvas konciza rekomendaro kaj la teksto de la Praga Manifesto de la Movado por la Internacia Lingvo Esperanto, kiu ne ellaboriĝis simpozie sed tamen proksime rilatas al ties temaro.

Nome de UEA, mi volas denove danki la Japanan Fondaĵon, kies subvencio ebligis la simpozion; Oomoton kaj Institucion Hodler, kies malavaraj kontribuoj plivastigis ĝin; la kongresan publikon, kies atenta aŭskultado kaj trafaj komentoj multon aldonis; la interpretistojn, kiuj bone plenumis malfacilan taskon; kaj, ne lastvice, mian kunredaktanton Suzanne Bolduc, kiu transformis disan kolekton de paperoj, diskedoj kaj sonbendoj en veran legindaĵon. Ke ĉiuj legantoj dividu nian kontenton pri la rezulto!

¹ Mi artikolis anglalingve pri tio en *Language Problems and Language Planning* 21/1, 1997, 66-77.